
# *Elekto de guberniestroj kaj vicguberniestroj en Kubo*




Havano, 7 jan (RHK) La venontan 18-an de januaro, okazos per interkonsento de la ?tata konsilantaro, la elekto de guberniestroj kaj vicguberniestroj provincaj. En tiu sama tago kunsidos la delegitoj de la municipaj asembleoj de la Popola Povo tra la tuta lando por vo?doni.

Kongrue kun la Konstitucio de la lando, en ?iu provinco gvidas provinca registaro, kiu funkcias stre?e ligita al la popolo. ?in givdas la guberniestro kaj provinca konsilantaro.

Kiel reprezentanto de la ?tato, tiu ?i registaro provinca havas la "esencan mision evoluigi ekononomie kaj socie sian teritorion, kongrue alla celoj de la lando, kaj agas kiel kunordiganto inter la strukturon centraj de la ?tato kaj la municipoj, por kio ?i kontribuas al harmoniigo de la provincaj kaj municipaj interesoj."

La guberniestro estas la supera gvidanto ekzekutiva-administra en la provinco; pro tio ?i anka? respondas anta? la nacia asembleo, la ?tata konsilantaro, la ministra konsilantaro kaj la provinca konsilantaro.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/211307-elekto-de-guberniestroj-kaj-vicguberniestroj-en-kubo

# Radio Habana Cuba